
# CARLAND Cross

M. OLEFFE — O. GRENSON

## 2 LA DOSIERO DE CARNARVON



ESPERAĴO


**Originala titolo:** *Carland Cross 2: Le Dossier Carnarvon*
**Aŭtoroj:** Michel Oleffe, Olivier Grenson
**Jaro de originala publikigo:** 1992

Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, aprilo 2025
**Esperanta traduko kaj kompostado:** Mikaelo Kastro




DEMONA VETERAĈO, HIGGINS, MI DEZIREGAS FINI ĈI TIUN DEĴORON.
MI VOLONTE DRINKUS UNU BONAN TASON DA TEO KUN KELKAJ GUTOJ DA BRANDO!
BRANDO? MALJUNA FRIPONO, KIE VI KAŜAS ĜIN?
HE HE! SE MI DIRUS AL VI, MI BALDAŬ PERDUS ĈIOM!
GRENSON . OLEFFE 91


LONDONO. UNU VESPERON DE NOVEMBRO 1937, IE PROKSIME DE LA HAVENETO DE WAPPING, MALPURA LOKO, ĈEFE KIAM PLUVIS (T.E. PRESKAŬ ĈIAM)
LA KAJOJ ESTAS INUNDITAJ, KVAZAŬ ĈI TIU VETERO SOLA NE SUFIĈUS! KAJ TAMIZO EKPURIGAS LA KELOJN DE ĈI TIU PUTRA KVARTALO. KION ALIAN NI RENKONTOS?
WAPPING DOCK
KAJ ALDONE, ĈI TIUJ BESTAĈOJ...
SANKTA DIO!!
RIGARDU, COLLINS! KIO DIABLE ESTAS ĈI TIU TERURAĴO?!
BRR... MI RESTAS ĈI TIE SOLA... APUD TIU... AĴO. ESTUS PLI BONE SE NI AMBAŬ IRUS PETI HELPON. COLLINS, MALJUNA KANAJLO, MI NENIAM BEZONIS VIAN BRANDON TIOM, KIOM NUN.
HASTU, COLLINS. IRU AL LA POLICEJO DE WAPPING, ĜI ESTAS LA PLEJ PROKSIMA. ONI SENDU ĈI TIEN AMBULANCON KAJ PATROLON.



MI... HO! UNU PLIA KADAVRO!
UF... JEN LA HELPOTRUPOJ!
ĈI TIEN! MI TROVIS DUAN KADAVRON!
MULTE MI ĜOJAS, KE MI VIDAS VIN, SINJOROJ... HO! SUPERINTENDANTO WINGFIELD!
DIRU, HIGGINS! KIO ESTAS ĈI TIU FABELO PRI MORTINTOJ? ĈU MI TROVOS KADAVROJN ĈIAM, KIAM MI FAROS RUNDON APUD LA RIVERO? ONI DIRUS, KE NI ESTAS EN AFERO TIPA DE CARLAND CROSS.
GESINJOROJ, ĈI TIEL KOMENCIĜAS LA STRANGA AFERO PRI LA DOSIERO DE CARNARVON!
CARLAND CROSS
O. GRENSON



TIUN VESPERON, LA MAJSTRO KAJ MI MANĜIS MALVARMAN ŜAFIDAĴON KAJ ORANĜPUDINGON.
NIA KARA SINJORINO STONE, KUTIME TIOM BABILEMA, NUN ŜAJNIS MALTRANKVILA KAJ ENMEMIĜINTA.
NU, MAJSTRO. KIEL PROGRESAS LA ESPLORADO, KIUN KOMISIIS AL VI LA BRITA MUZEO? LA ŜTELPROVOJ EN LA FAKO DE EGIPTAJ ANTIKVAĴOJ...
KURIOZA AFERO, MIA KNAB'. LA VIZITINTOJ AGIS TRE ZORGEME, ILI SENORDIGIS MALMULTAJN DOSIERUJOJN. SED VERŜAJNE ILI HAVIS TRE PRECIZAN CELON. KROME, NENION ONI ŜTELIS.
SINJORO CROSS, ĈU MI SURTABLIGU LA KAFON KAJ LA LIKVOROJN EN LA BIBLIOTEKO?
CERTE JES, SINJORINO STONE.
EK, JUNA AMIKO. NI PROFITU ĈI TIUN MOMENTON POR EKZAMENI LA LISTON DE LA DOKUMENTOJ, KIUJN LA MISTERAJ VIZITINTOJ DE LA BRITA MUZEO ŜAJNE KONSULTIS KUN MULTE DA ATENTO. ĈEFE NOTKAJEROJ RILATAJ AL PRIFOSADO DUM LA LASTAJ DEK KVIN JAROJ, SAME KIEL FRAGMENTOJ DE «LA LIBRO DE MORTINTOJ»...
HO, DIO MIA!
KLING
SINJORINO STONE!
??
S-INO STONE, KIO OKAZIS?
TIU AFERO, DIO MIA! TIUN AFERON MI VIDIS ANTAŬE!




TRANKVILIĜU, SINJORINO STONE, REAKIRU LA BONFARTON. DIRU AL MI, KIAL ĈI TIU BILDO DE ANUBO IMPRESAS VIN TIAGRADE?
SINJORO CROSS, VI CERTE MEMORAS MIAN AMIKON ANNABELLA WITCHET, KIU VENIS TEUMI KUN MI LA UNUAN ĴAŬDON DE ĈIU MONATO.
NU, ANTAŬ UNU JARO ŜI ENIRIS EN RIPOZDOMON REKOMENDITAN DE SINJORINO PRITCHARD, ELSTARA DAMO, VIDVINO DE PASTRO, KIU...
KARA SINJORINO STONE, ĈU VI IRU REKTE AL LA AFERO?
BONE, SINJORO CROSS, MI VIZITIS HODIAŬ LA MENCIITAN INSTITUCION, KIU NOMIĜAS DOMO RADWOR, POR ALPORTI AL ANNABELLA UNU EL TIUJ SPONGOKUKOJ, KIUJN ŜI ŜATAS. ŜIA LASTA LETERO ŜAJNIS AL MI STRANGA, KAJ MI SUSPEKTIS, KE IO MALTRANKVILIGIS ŜIN.
MI ESTIS MALBONE BONVENIGITA, SINJORO. PASIS ETERNO ĜIS ONI MALFERMIS AL MI LA PORDEGON.
LA DIREKTORO, IU SINJORO GUTTS, FINFINE SALUTIS MIN. ALTA KAJ MALBELA, SINJORO CROSS, VERA MUMIO. KAJ NENIOM AFABLA, ALIFLANKE.
SINJORINO WITCHET NE AKCEPTAS VIZITOJN ĈI-MOMENTE, PRO SUBITA MALBONIĜO DE SIA SANSTATO. MI NE POVAS PERMESI, KE VI VIDU ŜIN, SED MI PAROLOS AL ŜI PRI VIA VIZITO KIAM EBLOS.
ONI MIN FORPELIS MALĜENTILE. TIUJ FIULOJ EĈ KONSERVIS LA KUKON POR SI.
MI ANKORAŬ ESTIS SUB LA INFLUO DE TIU VIZITO KIAM MI VIDIS TIUJN PAPEROJN. ESTIS IDENTAJ PAPEROJ SUR LA TABLO DE SINJORO GUTTS.


MIASCIE, ŜATANTOJ DE EGIPTOLOGIO NE ESTAS MALOFTAJ, SINJORINO STONE. TIU VIRO RAJTAS INTERESIĜI PRI FUNEBRAJ RITOJ DE ANTIKVA EGIPTUJO.
NE, SINJORO CROSS, ESTAS IO ALIA... TIU SINJORO GUTTS KAŜIS ION AL MI, MI CERTAS PRI TIO! ESPEREBLE NENIO MALBONA OKAZIS AL MIA ANABELLA!
IRU RIPOZI, SINJORINO STONE. SENDUBE LA SCIIGO PRI LA MALSANO DE SINJORINO WITCHET TUŜIS VIN PLI OL ATENTITE.
JES! BONAN NOKTON...
KION VI OPINIAS PRI ĈI TIU RAKONTO, MAJSTRO?
ĈIO ĈI STRANGAS, ANDY. EN LONDONO FLUAS KLAĈOJ PRI SEKTO, KIU PRAKTIKAS LA EGIPTAN KULTON. MI HAVAS PECETOJN DE INFORMO, KVANKAM ĈIO ŜAJNE KONVERĜAS. LA AFERO PRI SINJORINO WITCHET PROBABLE ESTAS KOINCIDO, SED INDAS CERTIĜI PRI TIO. WINGFIELD ESTAS ĈI-NOKTE EN LA METROPOLA POLICEJO. DIRU AL LI, KE LI KOMENCU INSPEKTADON.
SED UNUE, ONI INFORMIĜU PLI PRI TIU DOMO RADNOR!
DUM LA MAJSTRO, KIEL KUTIME, SINKIS EN PRIPENSADON KAJ FUMON DE «NAVY CUT»...
... MI FALIS DE UNU SURPRIZO EN ALIAN.
ĈU? ĈU VI CERTAS PRI TIO? OFTAJ LIVERADOJ, ĈU?


MAJSTRO, LA AVENTURO DE S-INO STONE ESTAS PERPLEKSIGA. DOMO RADNOR ESTAS FERMITA DE ANTAŬ MONATOJ. ĜIAJ LASTAJ ENLOĜANTOJ FORPASIS JAM, VERŜAJNE. NUR UNU SOLA GARDISTO RESTAS TIE, LAŬ LA POLICEJO DE WAPPING. STRANGE, KE-MIAĴOJ ESTAS POGRANDE LIVERATAJ OFTE, POR SENINFEKTIGAJ CELOJ, ONI DIRAS..
DRIING
SALUTON, WINGFIELD! KIA KOINCIDO, ANKAŬ NI VO-LIS... KION VI DIRIS? DU KADAVROJ? APUD TAMIZO, PROKSIME DE LA KAJOJ DE WAPPING, ĈU? NI IROS TUJ.
METROPOLA POLICEJO.
NE TEMAS PRI NUR DRONINTOJ, MIA KNAB'. CETERE, LA KADAVROJ ESTIS TROVITAJ EN LA KAJOJ DE WAPPING, TRE PROKSIME DE DOMO RADNOR... KURIOZA AFERO, ĈU NE?
POLICE
JEN VI, SINJOROJ! MI ĜOJAS, KE MI VIDAS VIN. LA NEKROPSIISTO NENION KOMPRENAS!
ĈI TIU ESTIS DUONE SENTRIPIGITA. LA STRANGA AFERO ESTAS, KE LA TRANĈO ASPEK-TAS SCIENCE FARITA.
KAJ ĈI TIU: LI MORTIS KUN DU BRONZAJ HOKETOJ ĈE LA NAZO, TIO ESTAS ĈIO VIDENDA...!
TRANĈO ĈE LA MALDEKSTRA FLANKO, HOKETOJ EN LA NAZTRUOJ... ĈIELO, WINGFIELD, ĈU VI POVAS VENIGI LORDON PEMBROKE KIEL EBLE PLEJ RAPIDE?




ĈU?! LA EGIPTOLOGON? PRI KIO TEMAS ĈIO ĈI?
ĈI TIO ESTAS STRANGEGA RAKONTO, WINGFIELD. MI SUSPEKTAS, KE ĈI TIUJ KORPOJ ATENDIS MUMIIGON.
NU, CARLAND. MI SUPOZAS, KE ĈI TIO ESTAS NUR ŜERCO VIA.
MI PRESKAŬ KOMPLETE CERTAS, KE ĈI TIUJ TRANĈOVUNDOJ ESTAS PARTO DE TIA MUMIIGA RITO, KIAN EGIPTOJ FARIS ANTAŬ MULTE. SED MI ŜATUS HAVI KONFIRMON DE LORDO PEMBROKE, EMINENTULO VERKINTA DISERTAĴOJN PRI ĈI TIU TEMO.
DUME, EN STRATO BAKER.
HMM, MMM!
MMM... HO! VI...!
GRANFORD
ĈU VI PRENU PECON DE ĈI TIU BONEGA SPONGOKUKO, MIA KARA ANABELLA?
DANKON, SED ĈI TIAJ KUKOJ NE KONVENAS AL MIA SANSTATO, KARA MILDRED...
SED... SED VI... VI NE ESTAS ANABELLA!
NE... KAJ EĈ TIEL...




DIO MIA, KIA TERURA KOŜMARO! SUFIĈE! MI DEVAS ESPLORI ĈI TION ĜISFUNDE!
L' AFERO NE RESTOS ĈI TIEL... TIU DOKTORO GUTTS EKSCIOS KIU ESTAS MILDRED STONE!
JEN LA POŜLAMPO!
MI PORTU PISTOLON... NE... GLADILON...!
HA LO? JES, SENDU TAKSION AL LA DOMO DE CARLAND CROSS, ĈE STRATO BAKER. DEK MINUTOJ, ĈU? BONEGE.
EK, SINJORO, AL STRATO SAMPSON. IRU LAŬ LA PLEJ MALLONGA ITINERO, KAJ NE PROVU TROPAGIGI MIN!
JPZ 127
Old Curiosity Shop
EN ORDO, HALTIGU LA TAKSION, SINJORO, KAJ FORIRU TUJ.
RADNOR HOUSE






*Unu el la du epokoj, en kiujn dividiĝas la historio de Antikva Egiptujo.



EKSTERORDINARA AFERO, SINJOROJ. ĈI TIUJ KORPOJ ESTIS PRETIGITAJ POR MUMIIGO LAŬ LA MALNOVA RITARO!
LA VERTIKALA SENVISCERIGO: TIA, KIA ĜI ESTIS FARITA ANTAŬ LA EPOKO DE TUTMOSO LA 3-A. POST TIO, ENBALZAMIGISTOJ LABORIS PARALELE AL LA INGVENO.
KAJ ONI UZIS ĈI TIUJN HOKETOJN POR ELTIRI LA CERBON, ROMPANTE LA NAZAJN OSTOJN. FOJE, ONI ELTIRIS LA CERBON TRA LA OKULA KAVO, AŬ DANKE AL LA UNUIĜO KUN LA SPINO, POST SENKAPIGO, KOMPRENEBLE.
MIRINDE, ĈU NE?
TIO ESTAS NUR LA UNUA PARTO DE LA PROCEZO. ANKORAŬ RESTAS TRAKTI LA VISCEROJN APARTE KAJ METI ILIN EN KANOPOJN POR KONSERVI ILIN, SENHIDRATIGI LA KORPOJN...
REPLENIGI LA KAVOJN, UNKTI TOLAĴOJN PER RARAJ PARFUMITAJ OLEOJ, LAKI LA UNGOJN, ĈIRKAŬVOLVI LA KORPON DUM SEMAJNOJ... SINJORO CROSS, JEN ALVOKIĜO... PASIO... ARTO!
21
TRANKVILIĜU, SIRO. NUR DIRU... KIU, VIAOPINIE, POVUS PLENUMI TIUJN RITOJN ĈE LA KORPOJ DE ĈI TIUJ DU MALFELIĈULOJ?
NUR KELKAJ FAKULOJ, SED ĈI-MOMENTE ĈIUJ ESTAS EKSTER ANGLUJO. MORGAŬ MI SCIIGOS AL VI ILIAJN NOMOJN PER LETERO.
NU, POLICANO, DIRU AL MI... ĈU MI RAJTAS DAŬRIGI LA ENBALZAMIGON? VIDANTE LA STATON DE ĈI TIUJ DU INDIVIDUOJ, PREFERE ONI LASU SCIENCON ENPROFUNDIĜI EN LA AFERON!
NE PAROLU PRI TIO! KIA SKANDALO!
SENKLERULO! KRUDULO! BUROKRATO...!
EK, MIA KNAB'. ĈI-NOKTE NI NE TROVOS PLI DA INFORMO.


ŜIA ĈAMBRO DEVAS ESTI ĈI TIE... EN ŜIA LASTA LETERO ŜI MENCIIS LA ORIENTAN ALON.
ROOMS 15.24
ONI HAVAS ĈARMETAJN VAZOJN ĈI TIE... JEN, EN TIU KORIDORO!
15
23
ANNABELLA, KARA. NE EKTIMU, JEN MI, MILDRED STONE.
ANABELLA, VEKIĜU. DIO MIA, RIGARDU KIOM VI MALDIKIĜIS! MI ŜALTOS LA LUMON, ANNABE...
AAAAAH!



DIO MIA!
KIA TERURAÎO, ANNABELLA! ĈI TIO NE EBLAS...
HELPON, HELPON!
AAAAAH
JEN VI REVENIS, SINJORINO STONE!



MAJSTRO, NUR FRENEZULO POVUS PROVI EKSPERIMENTOJN TIEL TERURAJN.
SENDUBE, MIA KNAB', SENDUBE.
DO, ĈU ĈI TIU AFERO RILATAS AL LA ENROMPOJ OKAZINTAJ EN LA BRITA MUZEO?
EBLE NE. TAMEN, MI NE SURPRIZIĜUS SE SINJORINO STONE TUTE HAZARDE TROVIS TERURAN MISTERON. MI VOLEGAS FARI PRIDEMANDADON AL ŜI.
S-INO STONE!
S-INO STONE!
HO, EVIDENTE! KIAL MI NE PENSIS PRI TIO? ŜI CERTE ENLITIĜIS JAM.
RIGARDU, MAJSTRO! LA MANTELO DE SINJORINO STONE MALAPERIS, KAJ LA PORDO DE VIA SKRIBOĈAMBRO ESTAS MALFERMITA!
DAMNE! MANKAS KAJ MIAJ ĈEFŜLOSILOJ KAJ MIA POŜLAMPO! SENSAĜA VIRINO, DIABLE!
EK, ANDY! ANTAŬ OL ESTOS TRO MALFRUE!
SED...
MAJSTRO, NE DIRU AL MI, KE VI PENSAS...
JES, MIA KNAB', DOMAĜE JES...
GSY431
RADNOR HOUSE


ŜAJNE NI TRAFIS LA CELON, MAJSTRO!
JE UNUA VIDO, MIA KNAB', ĈI TIO ŜAJNAS SIMPLA PRIVATA KOLEKTO.
ĈU VI AŬDIS TION, ANDY? TIO ESTAS LA VOĈO DE SINJORINO STONE!
ÎÎÎÎÎH
KIA HUMIDECO! TAMIZO CERTE ESTAS PROKSIMA!
NU, VERŜAJNE NE TEMAS NUR PRI PRIVATA KOLEKTO...
ĈI-FLANKE ESTAS LUMO, MAJSTRO!




VI PROFANIS LA DOMON DE MORTINTOJ... NOME DE OZIRISO, DIO DE LA TRANSMONDO, DE FLUANTA NILO, JUĜISTO DE MORTO; NOME DE TIES FILO HORUSO KAJ LIAJ KVAR IDOJ IMSET, HAPI, DUAMUTEF KAJ KEBESENUF. NOME DE ANUBO, LA PROTEKTANTO DE MUMIOJ...
VI MORTOS POR PUNPAGI VIAN SAKRILEGION!
SED MI NENION FARIS, MUMIO... NU, SINJORO MUMIO... MI NUR CELIS VIDI ANNABELLA-N...
SILENTU, FILINO DE SETO! VIA LANGO ESTAS TIEL MALBONA, KIEL TIU DE KORNA VIPURO!
AŬSKULTU, SPECO DE ŜTIPO: MI ESTAS HONESTA VIRINO, ELLASU MIN TUJ!!
GARDISTOJ! MORTIGU TIUN MIZERULON!


PAN
PAFU LAŬVOLE, MIA KNAB'!
BAM
BAM
BAM
JE HORUSO, MORTIGU LA SAKRILEGI-ANTOJN!
EK, ANDY! LIBERIGU SINJORINON STONE DUM MI OKUPIĜAS PRI ĈI TIUJ ULOJ!
BANG
BANG
BANG
TCHAK
BANG
BANG
REZISTU, SINJORINO STONE!
MI ĜOJAS, KE MI REVIDAS VIN, MIA JUNULO!
VI DU IRU LAŬ LA ŜTUPARO, ANDY, MI SEKVOS VIN!
BANG
BANG
BANG
BANG
BANG
CLIC
CLIC
MI NE HAVAS PLIAJN KUGLOJN!





BLONK!!!
DANKON, SINJORINO STONE. NI FORIRU NUN.
DIO MIA! MIA KORO!
PAN
ĈIUJ LEVU LA MANOJN! KIO ESTAS TIU ĈI KARNAVALO?
?!
TOK
ZWIIII






*«Retroiru, rapide!»



MI FORIRU, KARA. SUFIĈE DA EMOCIOJ EN UNU NOKTO. MI CERTAS, KE VI TROVOS MULTAJN INTERESAJN INDICOJN.
CERTE, CERTE.
EK, SINJORINO STONE, BALDAŬ VI ESTOS SEKURA HEJME.
EN ORDO! HOWARD, FLINT, BUTTS KAJ FOSCOTT, LABORIGU ĈIUJN DISPONEBLAJN SKIPOJN. EK, RAPIDE!
BONE, ESTRO!
DANKON, SINJORO ANDY. BEDAŬRINDE MI NE POVAS ĈESI PENSI PRI LA KOMPATINDA ANNABELLA. KIA TERURAĴO!
ESTAS NEKREDEBLE, MAJSTRO. ATELIERO DE EGIPTA ENBALZAMIGO... EN LONDONO!
KAJ TIU TERURA VIRO... TIU VIVANTA MUMIO! KIEL LA REGISTARO KAJ LA KRONO POVAS PERMESI ION TIAN? MI PLENDOS...
ESTAS IO PLI MALTRANKVILIGA OL TIO, MIAJ AMIKOJ.
MI PROFITIS LA ĤAOSON POR ELPRENI ĈI TIUN KUGLON. ĜI ESTIS EN LA BRAKO DE STATUO, KELKAJN COLOJN FOR DE MI.
ĜI ESTAS LA SOLA, KIUN TIUJ SUPOZATAJ EGIPTOJ PAFIS. MI SCIVOLAS PRI ĜIA DEVENO. ĜI NE ESTAS ANGLA KUGLO.
KROME, MIA KNAB', ĈU VI AŬDIS PRI MULTAJ EGIPTOJ, EĈ SE MALVERAJ, SCIPOVANTAJ LA GERMANAN?
?


LA SEKVAN TAGON, EN LA OFICEJO DE LA ESTRO DE LA METROPO-LA POLICO: LORDO EVERETT FRANCIS STANHOPE BASINGSTOKE.
ENTUTE NI TROVIS 127 MUMIIGITAJN KORPOJN KAJ MATERIALOJN POR MUMIIGI PLI DA ILI. TIUJ FRENEZULOJ STARIGIS FUNEBRAN MUZEON KAJ KOMPLETAN ATELIERON DE MUMIIGADO. LORDO PEMBROKE, LA MALJUNA EKSTRAVAGANCULO, KIUN NI KONSULTIS, ESTAS RAVITA. LI NENIAM VIDIS ION SIMILAN, NE EĈ EN EGIPTUJO.
LA INVENTARO PRI TROVITAĴOJ ESTAS PLI LONGA, SED UNUAVIDE, TEMAS NUR PRI AĴOJ... NU, FA-TRASO EGIPTA...
NU, WINGFIELD, NE DIRU AL MI, KE TIUJ VENKITAJ DE SINJORO CROSS EN DOMO RADNOR ANKAŬ FUĜIS SENSPURE.
ALIVORTE... NU JES, SINJORO! TIUJ KRI-MULOJ UZIS LA RE-TON DE KLOAKOJ KAJ FORPORTIS SIAJN MORTINTOJN. ILI RE-TRETIS KUN EKSTER-ORDINARA DISCIPLINO.
ILI CERTE NE PRETERLASUS BELE-GAJN MUMIIGENDAJN KADAVROJN... NU, WINGFIELD, KION VI PENSAS, KE NI DEVAS DIRI AL LA GAZETARO? ĈU VI KREDAS, KE LA ĈEFMINISTRO KON-TENTIĜOS PER VIAJ KLARIGOJ?
MI VOLAS REZUL-TOJN, KAJ RAPIDE. KONTROLU ĈU SINJORO CROSS EMAS KUN-LABORI KUN LA METROPOLA POLICO. EBLE LI AKCEPTOS. VI POVAS RETIRIĜI JAM, SINJORO.
PFF! BEDAŬRINDE, MI EĈ NE SCIAS KIEL TRAKTI ĈI TIUN AFERON.
BONE, WINGFIELD, NE SENKURAĜIĜU NUN.
MI AGNOSKAS MIAN PERPLEKSECON. SED JAM MULTFOJE EN LA PASINTECO NI KAPA-BLIS SOLVI LA AFERON.
EL KIE VI PRENIS TIUN ĈI FOTO-GRAFAĴON?
M.C _ 928
ĜI ESTIS INTER LA PAPEROJ FORLASITAJ DE TIUJ MALVERAJ EGIPTOJ. LA SOLA AĴO NERILATA AL EGIPTUJO. SED MI ANKORAŬ NE SCIAS KIU ESTAS TIU DAMO.
MIRINDE, WINGFIELD! JEN LA PECO, KIU MANKIS AL NI.


BONE, CARLAND, KLARIGU!
NE TIEL RAPIDE, WINGFIELD! LA LIGO INTER ĈIUJ INDICOJ ESTAS TRO MALDIKA POR FARI KONKLUDOJN. MI DEVAS PLENUMI KELKAJN ESPLORADOJN.
ANDY, PRUNTEPRENU AŬTON DE LA METROPOLA POLICEJO KAJ EKLABORU. MI ŜATUS SCII KIEL EBLIS STARIGI ATELIERON DE ENBALZAMIGO EN DOMO RADNOR.
BONE, MAJSTRO.
NEPAROLEMULO!
SINJORINO STONE, MI ENFERMIĜOS EN LA LABORATORIO. MI VIDOS VIN JE LA VESPERMANĜO-HORO.
EKZAKTE TIO, KION MI SUSPEKTIS... GERMANA KUGLO.
JEN! FARIĜIS LA LIGO. ĈI TIU INO ESTAS DAMO EVELYN HERBERT, FILINO DE LORDO CARNARVON, LA UNUA VIRINO ENIRINTA EN LA TOMBON DE TUTANĤAMONO, LA 27-AN DE NOVEMBRO 1922.
LA KOLĈENO, KIUN SURHAVIS LA «VIVANTA MUMIO» DE DOMO RADNOR ESTAS KOPIO DE LA KOLĈENO, KIUN TROVIS HOWARD CARTER ĈE TUTANĤAMONO. TAMEN TIO NE KLARIGAS LA KRIMOJN DE LA ENBALZAMIGISTOJ, NEK LA IMPLIKIĜON DE GERMANOJ.
FRAP FRAP
SINJORO CROSS, SUPERINTENDANTO WINGFIELD KAJ PROFESORO PEMBROKE VENIS. ILI INSISTAS, KE VI DEVAS PAROLI KUN ILI TUJ.
MI TUJ IROS, SINJORINO STONE.



CROSS, MI DEVAS PAROLI KUN VI. VI SCIAS JAM, KE LA METROPOLA POLICO KONSULTIS MIN PRI ĈIO OKAZINTA EN DOMO RADNOR. SED MI ĴUS EKSCIIS, KE LORDO BASINGSTOKE KONFIDIS AL VI LA ESPLORADON.
MI ĜOJAS PRI TIO, ĈAR MI ABOMENAS POLICANOJN. ILI ESTAS SENKLERAJ KAJ MANKAS AL ILI INSTINKTO.
KION VI DEVAS DIRI AL MI TIEL URĜE, SINJORO?
NEKREDEBLAĴOJN, CROSS. UNUE, LA MUMIIGOJ ESTIS FARITAJ EN ELSTARA MANIERO. LA MIKSAĴO UZITA POR ELSEKIGI LA KORPOJN ESTAS TRE SIMILA AL LA NATRO DE ANTIKVAJ EGIPTOJ. KARBONATO KAJ NATRIA NITRATO. KAJ LA ENVOLVAĴO TRE PRECIZE RESPEKTAS LA RITARON!
TIO ANKORAŬ NE KLARIGAS LA IDENTECON DE LA FARINTO DE TIUJ STRANGAJ MURDOJ. ĈU VI NE PROMESIS AL MI LISTON KUN LA NOMOJ DE KOLEGOJ VIAJ, KIUJ POVUS PRAKTIKI TIAJN AGOJN...? JE SCIENCISTA NIVELO, DO.
TIU LISTO PLENA JE ŜTIPOJ ESTAS MALGRAVA. NENIU EN ANGLUJO KAPABLIS DISVOLVI TIUN SCIENCON TIOM MULTE, KROM CULCOMBE, JAM MORTINTA. ĈI-TEMPE, ONI POVAS RIGARDI KIEL FAKULOJN NUR SINJORON BACHELIER, EL LUVRO, KAJ SINJORON MECKERN, EL BERLINO.
ĈI TIU DUA HIPOTEZO ESTAS PLI FUNDAMENTITA, IEL AŬ ALIE. UNU PARTO DE LA MEBLARO DE DOMO RADNOR ŜAJNE TROVIĜAS EN MIAJ INVENTAROJ PRI LA KOLEKTOJ DE LA EGIPTA MUZEO DE BERLINO.
SED ANKORAŬ ESTAS IO PLI GRAVA!


SAMTEMPE...
CLINK WHARF LTD.
JEN LA NAŬA MAGAZENO, KIUN MI VIZITAS ĈI-VESPERE... ĈU MI HAVOS BONŜANCON ĈE CRUMBBS?
BARNABAS CRUMBBS HOUSES & REMOVALS
BARNABAS CRUMBBS HOUSES & REMOVALS
UF! ANKORAŬ ESTAS IU ENE!
BONAN VESPERON, SINJORO CRUMBBS, MI...
BONAN VESPERON, JUNA SINJORO. VI SENDUBE VENIS PAROLI PRI DOMO RADNOR, ĈU?
KIO?! KIEL VI SCIAS TION?
ONIDIROJ, AMIKO. NOVAĴOJ RAPIDE DISVASTIĜAS EN NIA KOLEGARO. MI SCIIS, KE VI VENUS.
VI ESTAS BONŜANCA. MIA KOMPANIO ESTAS TIU, KIU OKUPIĜAS PRI VARLIVERADO AL DOMO RADNOR. SUB LA REGADO DE LA KOMISIITO.
IRLANDA MALDISKRETULO NOMATA GEOFF FLANAGAN... ĈU NE, GEOFF?
MI... HOO!
BONAN VESPERON, SINJORO!






*Egiptologia instituto apartenanta al Universitato de Oksfordo.



FREMDULO, MIAJ BANDAĜOJ ESTAS TIO, KIO VIN IMPRESAS, ĈU? MI HAVAS LA HAŬTON SKRAPITAN PRO KE MI KAJ MIAJ KNABOJ ŜARĜIS NIN PER TIOM DA TIUJ DEMONAJ SALSAKOJ.
EK, GEOFF, MI CERTAS KE ĈI TIU JUNA SINJORO NUR CELAS REGALI VIN PER KELKAJ PLENGLASOJ INTERŜANĜE DE RESPONDOJ AL DEMANDOJ. DIRU AL LI TION, KION VI SCIAS PRI DOMO RADNOR.
FREMDULO DONANTA PLENGLASON ESTAS AMIKO. VISKION MI PETAS. IRLANDAN, KOMPRENEBLE.
SE LA INFORMO ESTAS BONA, VI HAVOS BARELON DA VISKIO. SED UNUE DIRU AL MI KIUJ ESTAS VIAJ KLIENTOJ KAJ KIE VI RICEVAS LA PAKETOJN.
STRANGA AFERO, JUNULO. ĈIO FARIĜIS PER POŜTO: LA FAKTUROJ ESTIS PAGITAJ PER KONTANTA MONO. ONI METIS LA MONON EN NIAN LETERKESTON.
REGISTER
XXII
ĈU NE EKZISTIS IU LOKO POR PRENI LA VAROJN?
VENU, AMIKO. TIU LOKO ESTAS PROKSIMA. SED L' IRADO MALFACILAS PRO LA NEBULAĈO.
JEN LA LOKO. NI NE VENIS DE ANTAŬ KELKAJ TAGOJ. MIAOPINIE NENIU ESTAS ĈI TIE.
26
27


ĈU VI MEMORAS LA BILDON, KIUN VI TROVIS EN DOMO RADNOR, WINGFIELD? BONE DO, TIU VIRINO PETIS PROTEKTON DE LA METROPOLA POLICO. ŜI ESTAS DAMO EVELYN HERBERT, FILINO DE LORDO CARNARVON.
DAMO EVELYN, VE!
DIO MIA!
MI BEDAŬRAS FORLASI VIN ĈI TIEL, AMIKOJ, SED LORDO BASINGSTOKE INSISTAS, KE MI TUJ PREZENTIĜU EN HIGHCLERE, LA LOĜEJO DE FAMILIO CARNARVON. MI ESPERAS TROVI ION, KIO HELPOS NIN ANTAŬENIRI EN ĈI TIU MISTERA AFERO...
TRANSDONU MIAN SALUTON AL DAMO EVELYN, SINJORO CROSS. ŜIA PATRO KAJ MI ESTIS TRE PROKSIMAJ.
WINGFIELD, SCIIGU ĈI TIUN NOVAN INFORMON AL ANDY. MI KOMISIIS AL LI FARI KROMAN ESPLORADON NUN. ALIFLANKE, AL MI PLAĈUS SE VI POVUS PETI VIAJN AMIKOJN ĈE LA OFICEJO PRI EKSTERLANDAJ AFEROJ PRI INFORMO RILATA AL LA GERMANA KOLONIO EN LONDONO...
KUN PLEZURO, CARLAND, SED... KIAL LA GERMANOJ, JE MIL DEMONOJ?
MI KLARIGOS AL VI POSTE... ĜIS, MALNOVA AMIKO.
OGE 27
LASINTE LA SURPRIZITAN SUPERINTENDANTON WINGFIELD, CARLAND CROSS ELIRIS EL LONDONO, CELANTE LA OKCIDENTON.
HIGHCLERE, BURGHCLERE... MI IRAS LA ĜUSTAN VOJON. BALDAŬ MI NENION VIDOS...
HIGHCLERE, LA BIENO DE LA GRAFO DE CARNARVON.



KLAK
NE RESTAS MULTAJ HOMOJ ĈI TIE. ONI FORPORTIS ĈION. ONI EĈ BRULIGIS KELKAJN AĴOJN. KIA ODORAĈO!
NENIO INTERESA ĈI TIE... ĈI TIO ASPEKTAS KIEL KARBIGITAJ OSTOJ KAJ ŜTOFO... KIA FETORO! ĈIELO, KIO ESTAS ĈI TIO?
ĈAPO DE MARISTO... ĜI ŜAJNE ESTAS GERMANA.
NI PAFU NIN FOR. ĈI TIU LOKO NE PLAĈAS AL MI.
IO MOVIĜIS! ESTAS IU TIE!
CALVIN, MALJUNA VISKIEMULO... KION FARAS VI ĈI TIE?
MI RIFUĜIS, GEOFF. ESTAS MALVARME, KAJ ŜNAPSO ESTAS MALABUNDA. KIEN VI VOLAS, KE MI IRU?
JE DIO MI PETAS, CALVIN, ĈU VI VIDIS ION ĈI TIE? MI POVOS REKOMPENCI VIN BONE.
CERTE JES, ION, KIO MERITAS GALJONON DA ĜINO. STRANGAJ KARNAVALECAJ ULOJ ELIRIS EL LA KLOAKOJ, SED ILI NE PAROLIS NIAN LINGVON. KAJ ILI SURIRIS SUR ŜIPON, IOM MALPROKSIME DE TIE ĈI...
KIE, CALVIN? MONTRU AL MI!
?!
KIEN ĜI IRIS, DO?
DAMNE!



MI NE KOMPRENAS, ĜI ESTIS TIE HIERAŬ! MENCIINDAS, KE MI ESTIS JA EBRIA, SED...
STREĈU VIAN MENSON, CALVIN! ĈU VI MEMORAS LA NOMON?
DRINKEMULO, BA!
LA NOMO ESTIS STRANGA, CERTE TIU ŜIPO NE ESTIS ANGLA!
EBLE ESTAS ALIA SOLVO, SINJORO. PAROLU KUN BOBBY DOYLE. LI ESTAS TIU, KIU OKUPIĜAS PRI LA ENREGISTRIĜOJ EN LA IMPOSTOFICEJO DE LA KAJOJ. LIA OFICEJO NE ESTAS MALPROKSIMA.
NI IRU!
HE, ATENDU MIN! VI PROMESIS AL MI UNU GLASON!
JEN! HUUU, HUUUU, BOBBY! BOBBY!!
ĈU FINIĜOS IAM VIA KRIADO?! BOBBY ESTAS EN TAVERNO, KIEL KUTIME! KRIU ĈE LA FENESTROJ DE L' «REĜA KRONO», EBRIULOJ ŜATOS TION!
«REĜA KRONO» ESTAS BONA TAVERNO. LA TIEA VISKIO BONGUSTAS, KAJ LA MANĜPORCIOJ ESTAS SUFIĈE ABUNDAJ.
DIRTY DICKS
ĈI-FOJE VI ESTIS BONŜANCA, JUNA SINJORO. JEN BOBBY DOYLE DRINKANTA SIAN GLASON DA ELO..
WOUAH!



ENPAŜU, SINJORO CROSS. LA SINJORINO SENTOS SENPEZIĜON KIAM ŜI VIDOS VIN.
MAVIS, BONVOLU EVITI TRO LACIGAN INTERVJUON POR NIA SINJORINO. VI SCIAS KAJ PRI ŜIA NERVOZECO KAJ PRI MIA MALAPROBO AL ĈI TIU INICIATO.
BONE, SINJORO PLUMKETT.
MI CERTE SPERTIS PLI VARMAJN BONVENOJN. TIU PLUMKETT HAVAS VINAGRAN HUMORON.
PARDONU LIN, SINJORO CROSS. NI ĈIUJ MALTRANKVILAS PRO LA SINJORINO. MI VENIGOS ŜIN, RESTU ĈI TIE.
ALICE'S ADVENTURES IN WONDERLAND
LEWIS CARROLL
LAŬDON AL DIO, SINJORO CROSS. FINFINE!
ELKORAN SALUTON, MIA SINJORINO. LORDO BASINGSTOKE SCIIGIS MIN PRI VIA PETO.
TIO, KION MI TUJ RAKONTOS, EBLE ŜAJNOS AL VI STRANGA, SED... MI SENTAS MIN ĈIRKAŬATA DE MALAMIKAJ ESTULOJ. MI CERTAS, KE IU TRARIGARDIS LA DOKUMENTOJN DE MIA PATRO. MI ESTAS TRAFITA DE VERTIĜOJ. MI EKSENTAS, KE MIA IDENTECO ESTIS FORŜTELITA DISDE MI. MIAJ NOKTOJ PLENAS DE TERURAJ VIZIOJ.
MI ESTAS TIMIGITA, SINJORO CROSS, TRE TIMIGITA! LIBERIGU MIN DE LA VIRO KUN MUMIA VIZAĜO!
ĈU?!



SINJORINO, MI PETEGAS! TIO, KION VI RAKONTAS ESTAS GRAVA! KIU ESTAS TIU VIRO?
CULCOMBE. LI ESTIS UNU EL LA HELPISTOJ DE MIA PATRO. LIA TERURA VIZAĜO MIN PERSEKUTAS.
LI ĈEESTIS LA MALKOVRON DE LA TOMBO DE TUTANĤAMONO. MI PENSAS, KE LI ESTIS UNU EL LA PLEJ AFEKCITAJ KAŬZE DE LA MALBENO. «MORTO TRAFOS PER SIA FLUGILO LA PERTURBANTON DE LA FARAONA RIPOZO».
VI SCIAS, KE PASIS TRI JAROJ INTER LA MALKOVRO DE LA KRIPTO KAJ LA MALFERMO DE LA SARKOFAGO. DUM TIU INTERTEMPO, ONI INVENTARIS LA MIRINDAJN RIĈAĴOJN ARIGITAJN EN LA TOMBO. SPERTINTA DU KRIZOJN DE DEMENCO, CULCOMBE TAMEN DAŬRIGIS SIAN LABORADON. LI ESTIS UNUARANGA PROFESIULO, FAKA PRI PROCEZOJ DE ENBALZAMIGO. MIA PATRO MORTIS DUMTEMPE, SED NIA AMIKO HOWARD CARTER PLUSKRIBIS AL MI...
EN OKTOBRO 1925, KIAM ONI MALFERMIS LA ĈERKON, CULCOMBE TUTE FRENEZIĜIS. LI KREDIS, KE LI ESTIS LA FORPASINTA REĜO. LA VENĜO DE TUTANĤAMONO FARIĜIS LIA VENĜO. LIA FIZIONOMIO ŜANĜIĜIS, KAJ LIAJ KOLEGOJ ESTIS DEVIGITAJ INTERNIGI LIN EN FRENEZULEJON. LI MORTIS ANKORAŬ SENRACIA, LAŬ KION MI SCIAS.
TIU ESTAS LA VIRO APERANTA EN MIAJ KOŜMAROJ. LI ESTAS TERURA VIDAĴO, KAJ INSULTAS LA MEMORON DE MIA PATRO, KIU HAVIS LIAN SAMAN PATRIOTAN IDEALON.
PRI KIU PATRIOTA IDEALO VI PAROLAS, SINJORINO?
PRI KOMISIO DE LA BRITA ARMEO, AL KIU MIA PATRO, LORDO CARNARVON, ĈIAM ESTIS LIGITA. MI NE SCIAS MULTE; NUR TION, KE MIA PATRO KONFIDIS RESPONDECON PRI LA AFERO AL IU LORDO TENNIEL, KIUN LI KROMNOMIS «SINJORO DE L' MIRLANDO».
KAJ TIU CULCOMBE... KIEN LI IRIS?
LI MORTIS EN LONDONA KURACDOMO. MI ANKORAŬ KONSERVAS LETERON, KIUN HOWARD CARTER SKRIBIS PRI TIO... JEN ĜI. DOMO RADNOR, STRATO SAMPSON, LONDONO.
MIA DAMO, NI NE RESTU ĈI TIE EĈ DUM UNU PLIA MINUTO!



KING'S CROWN
ATENDU, ULOJ... FRONTE AL STAPLO 27, ĈU? JES, MI NUN MEMORAS. TEMAS PRI GERMANA ŜIPO NOMATA «STADT...» ATENDU... «STADT LÜBECK», JES JA. ĜI FORIRIS HIERAŬ.
ĈU VI SCIAS KIEN ĜI CELIS IRI, BOBBY?
JEN LA STRANGA PARTO, JUNULO. LA ŜIPO ŜANĜIS SIAN BASENON. LA ŜIPESTRO -MALBELEGA ULO, DIRANTE PARENTEZE- ŜAJNE DEZIREGIS FORLASI SIAN BOLARDON KAJ TROVI ALIAN. NUN LA ŜIPO PROBABLE ESTAS EN UNU EL LA NOVKONSTRUITAJ BASENOJ.
NOVKONSTRUITAJ BASENOJ...
BARCLAY'S STOUT
GEOFF KAJ CALVIN: VI DU VOKU LA POLICON, SPECIFE SUPERINTENDANTON WINGFIELD EL LA METROPOLA POLICO, KAJ RAKONTU ĈION AL LI. DIRU AL LI, KE MI FORIRIS SERĈE DE TIU DAMNITA ŜIPO, KAJ REGALU LIN PER UNU GLASO JE MIA SANO...
KIA BENO!
HE, AMIKO. NE ESTAS SAĜE FORIRI SOLA. ATENDU ĜIS NI EL-TRINKOS LA LASTAN...
NEW BASIN
STADT LÜBECK
«STADT LÜBECK», FINFINE!


NE EBLAS FORIRI TUJE, SINJORINO. MI PROPONAS, KE ONI PRETIGU LA VALIZOJN KAJ SCIIGU LA PERSONARON DE VIA HOTELO EN LONDONO, POR KE ĈIO ESTU PRETA KIAM VI ALVENOS TIEN.
TIU ĈI SINJORO POVUS REVENI MORGAŬ POR PRENI VIN.
DANKON, PLUMKETT. VI PRAVAS, KIEL ĈIAM.
ALICE'S ADVENTURES IN WONDERLAND LEWIS CARROLL
ADIAŬ, MIA DAMO. MI REVENOS MORGAŬ. DUME, NE DIRU AL IU EĈ UNU VORTON PRI NIA INTERPAROLADO.
TIUJ MENSOGULOJ TAKSAS MIN NAIVA. KVANKAM TIU PLUMKETT BONE MANOVRIS POR MIN FORMETI...
CARLAND CROSS NE ESTAS TIEL FACILE FORMETEBLA...
UNU TUR-NIĜO KAJ...
... KAJ MI NERIMARKITE ATINGAS LA MALANTAŬAN PARTON DE LA BIENO.
!?


HODIAŬ VIRO ENIRIS EN VIAN HEJMON POR PRENI VIN FOR DE MIA VENĜO, SED ONI SUKCESE ELPELIS LIN. NENIO SUPERFORTOS LA VOLON DE LA FARAONO. VI PAROLOS, KAJ POSTE VIA KORPO ESTOS OFERITA AL LA DIO DE MORTINTOJ!
MI FAROS ĈION, KION VI ORDONOS!
JEN LA PREZO DE MIA INDULGEMO: DIRU AL LA PASTROJ DE ANUBO KIE KAŜIĜAS LA SEKRETOJ, KIUJN VIA PATRO ŜTELIS EL EGIPTO.
NE SCIAS MI... LORDO TENNIEL? MIRLANDO!
JEN LA REKOMPENCO PRO VIA SILENTO. GARDISTO, MORTIGU ŜIN!
ONI DROGIS TIUN KOMPATINDAN VIRINON! MI INTERVENU!





*«Unu momenton, mi petas!»
**«Rapide!»


KION VI DIRAS? MULTE DA AKTIVECO INTER LA AMBASADEJO KAJ KOMERCA ŜIPO... «STADT LÜBECK», ĈU? EN LA BASENOJ DE LA KAJOJ WAPPING. BONE, BONE...
DAMNE, L' ULOJ ĈE LA OFICEJO PRI EKSTERLANDAJ AFEROJ EKNERVOZIĜAS. FOSCOTT, PROVU TROVI GERMANAN ŜIPON NOMATAN «STADT LÜBECK» KAJ GVATU ĜIN. NIAJ KOLEGOJ SUSPEKTAS ILIN DE ANTAŬ IOM DA TEMPO...
CITY OF LONDON
205
GERMANOJ! KIEL DIABLE CROSS DIVENIS TION?
DRING
SINJORO? JEN COLLINS, EL LA POLICEJO DE WAPPING. NI TROVIS VIAN MUMION, HAHAHA! LI ODORAĈAS JE VISKIO KAJ PAROLAS KUN FORTA IRLANDA AKĈENTO. CETERE, ANDY WHITE KOMISIIS AL LI, KE LI TELEFONU AL VI...
212
KION NI FARU, SINJORO?
NE PERDU LIN EL VIA VIDO. TRE OPORTUNE, MI DEVAS FARI ION EN WAPPING. MI IROS TUJ.
LOCH LOMON
BRANDY
ANDY WHITE PETIS AL MUMIO PAROLI KUN NI! ĈU VI RIMARKIS? CARLAND CROSS ĈIAM ENMIKSAS NIN EN ĈI TIAJN SITUACIOJN.
BONE, TUTANĤAMONO, ĈU VI ELSARKOFAGIĜIS?
MI NE NOMIĜAS TUTUNĤO... KIO AJN. MI ESTAS GEOFF FLANAGAN KAJ ONI KOMISIIS AL MI INFORMI VIN PRI TIO, KE ANDY WHITE FORIRIS SERĈE DE ŜIPO «STADT LÜBECK»...
CERTE, SINJORO!
KIO?!




*«Elkoran bonvenon en la ŝipo, sinjoro White»


AŬSKULTU, CALVIN, ESTUS PLI BONE SE NI NE LASUS TIUN JUNULETON VAGADI ĈIRKAŬ TIU DEMONA ŜIPO, DUM NI PLAĈE DRINKAS ĈI TIE.
BARCLAY'S STOUT
VI PRAVAS, GEOFF. KAJ NOTU, KE DANKE AL LI, NI POVUS RICEVI REKOMPENCON.
LA POLICO PROBABLE NE ALVENIS ANKORAŬ, ĈU VI KREDAS, KE NI HAVOS SUFIĈE DA TEMPO POR...?
HE, BRUCE! HODIAŬ ONI PAGOS LA TUTAN KALKULON!
JA UNUAFOJE, ĈU NE, PARO DA DRINK-EMULOJ?
KIA NEBULAĈO! MI NE SURPRIZIĜUS SE LA JUNULETO PERDIĜIS.
ĈIELO! LA ULOJ, KIUJN MI VIDIS ANTAŬE EN LA STAPLO! ĈU VI VIDAS ILIN, SAME KIEL MI?
JES, KAJ ŜAJNE ILI DIREKTIĜAS AL LA ŜIPO!
HASTU, NI SEKVU ILIN!
FIRE ALARM
!?




*Gvidanto: *Führer* en la originalo. Alnomo de germana diktatoro Adolf Hitler.
**«Ĉu ne, miaj sinjoroj?»




*«Jes, jes. Enbalzamigo, bone»





*Kanajlo, fiulo (laŭvorte «porka hundo»)


KAPTU ILIN, SCHNELL!*
BAM BAM
DAMNE! ALPORTU BAZUKON!
BONG
ONI ŜAJNE ESTAS KAPTITA KIEL RATO, ĈU NE, SINJORO?
BONG
Swift's
NE. RIGARDU ĈI TION. JEN LUKO!
EK! EKSPLODIGU TIUN PORDON !
MAJSTRO, ELSALTU! LA ŜIPO EKSPLODOS!
GLUB... GLUB...
BONAN VOJAĜON AL INFERO, CROSS!
FEUER


*«Rapide!»


BAAAROOM
DIO MIA, LA MAJSTRO!
JEN, ANDY!
LI ELSALTIS ĜUSTATEMPE!
LI ESTAS NUR IOM VUNDITA.
JEN CROSS KAJ ANDY! EK, VI ĈIUJ, AL LA BOATOJ!
RIGARDU, CALVIN! JEN LA POLIC'! ĜI ĈIAM ALVENAS JE LA PLEJ KONVENA MOMENTO!
MIN NE ĜENAS REVIDI VIN, WINGFIELD!
MI DIRAS LA SAMON! IAM ONI PETIS AL MI TAKTON KAJ DISKRETECON EN ĈI TIU AFERO, HA! KIA ŜERCO!
DRINKEMULOJ VIN SALUTAS, SINJORO SUPERINTENDANTO!
KOMPRENEBLE JES...


KION FARAS VI ĈIUJ?
NI ELAKVIGAS GRANDAN ARMEON, SINJORO!
PORTU ĈIUJN ĈI TIUJN HOMOJN AL LA POLICEJO!
VIA TENIĜO ŜAJNAS MILI-TISTA AL MI, WINGFIELD!
KIO DIABLE...? HO! LORDO BASINGSTOKE!
JES, MI SENDIS SKIPON AL HIGHCLERE POR ANSTATAŬI SINJORON CROSS DUM LA NOKTO, KAJ ONI TROVIS SUS-PEKTINDA LA HASTAN FORIRON DE DAMO EVELYN. PLUMKETT, LA ĈEF-SERVISTO, KONFESIS ĈION RAPIDE.
SE UNU EL LA PLEJ GRANDAJ FAMILIOJ EL ANGLUJO NE FUNEBRAS ĈI-MOMENTE, TIO ESTAS DANKE AL SINJORO CROSS. MI ESPERAS, KE VI APROBOS MIAN ELEKTON DE ĈI TIU GRANDA DETEKTIVO, DAMO EVELYN.
SINJORO CROSS, FAMILIO CARNARVON ETERNE DANKOS VIN. ANKAŬ VIN, LORDO BASINGSTOKE.
FAMILIO CARNARVON KAJ KOMPANIO POVUS MONTRI SIAN DANKEMON REGALANTE NIN DU PER PO UNU GLASO. NI FROSTIĜAS!
GRENSON OLEFFE 91





*La Tria Regno (t.e. Germanio inter 1933 kaj 1945)


JEN DAMO EVELYN, RESANIĜINTA POST LA FORTAJ EMOCIOJ, VERŜAJNE.
JES, KAJ MI ŜATEGAS MIAJN NOVAJN ĜARDENISTOJN: SINJORON CALVIN KAJ SINJORON GEOFF.
MI PENSAS, KE MI PREFERIS VIN KOVRITAN JE RUBANDOJ!
ĈIAM TIEL AFABLA, SINJORO WINGFIELD!
DIRU AL MI, SINJORO CROSS, RESTAS UNU NIGRA PUNKTO EN ĈI TIU AFERO. LA SUPOZATA SEKRETO, KIUN MIA PATRO LASIS SKRIBITA EN SIAJ KAJEROJ... ĈU ĜI VERE EKZISTAS?
LA KUNIKLO, KIUN VI TENAS EN VIAJ BRAKOJ, ĴUS DONIS AL MI LA SOLVON. PENSU PRI LA MIRLANDO DE LEWIS CARROLL, KAJ PRI KIU ĜIN ILUSTRIS TIEL BELE: JOHN TENNIEL. MI RIMARKIS, KE TIU LIBRO TROVIĜAS EN ELSTARA LOKO EN LA BIBLIOTEKO CARNARVON. LA LIBRO EBLE KAŜAS EN ĜI IAN SEKRETAN KODON. MORGAŬ MI SCIIGOS LA SERVON DE MALĈIFRADO PRI TIO.
ĈI TIU VESPERO... ĈU ĜI NE ESTAS RAVA, MIA DAMO?
PERFEKTA, SINJORO CROSS.
M.OLEFFE
The End
O.GRENSON 1991

# EPILOGO

LA SERVO DE MALĈIFRADO BEZONIS TRE MALMULTE DA TEMPO POR MALKOVRI LA SEKRETAN KODON, KIU ESTIS RUZE KAŜITA EN UNU EL LA ILUSTRAÎOJ DE «ALICO EN MIRLANDO», DE LEWIS CARROLL... LA TIPA DESEGNAÎO DE RIVERO NILO EN LA SUPRA MALDEKSTRA ANGULO PERMESIS AL ONI SIGNI KVAR PUNKTOJN, KIUJ INDIKIS LA LOKOJN DE LA SUBTERAJ ĈAMBROJ SERVINTAJ KIEL TENEJO DE MUNICIO DUM LA DUA MONDMILITO, TIEL KONTRIBUANTE AL LA DETRUO DE LA ARMEO DE ROMMEL.




ILUSTRAÎO DE JOHN TENNIEL